

FRANCA DRAMARTO JE LA FINO DE LA XVII-a
ĜIS KOMENCO DE LA XVIII-a JARCENTOJ.

LJUDMILA MURSALIJEVAj (RU)

Franca dramarto je la limo de la XVII-a — XVIII-a jarcentoj evoluis sub komplikaj historiaj kondiĉoj, en epoko de la krizo de franca absolutismo. En la komenco de la XVII-a jarcento franca absolutismo ludis progreseman rolon, favoris unuiĝon de la lando kaj la kreon de unueca ŝato. Sed en la lastaj jaroj de la regado de Ludoviko la XIV-a la absolutismo transformiĝis en bremsilon de socia evoluo, ĝi malhelpas sukcesan evoluon de novaj kapitalismaj rilatoj, pliprofundigas la konflikton inter burĝaro kaj nobelaro.

La teatro evoluas en la kondiĉoj de reakcio kaj teroro, la ekleziaro protestas kontraŭ spektakloj, opinias ilin pekemaj kaj malutilaj por la socio. La registaro persekutas la teatron: en 1697 el Francio estis forpelitaj italaj aktoroj, kiuj primokis la reĝan edzinon madame de Maintenon. Eke 1702 la polico kontrolis la repertuaron.¹

En tiu tempo la klasika tragedio dekadencas. Multaj sentalentaj imitantoj (Pradon, Genest, Longepierre) de grandaj klasikistoj Corneille kaj Racine verkis tragediojn lau certa modelo, iliaj personoj, prenitaj el la antikveco, diferenciĝis nur pere de siaj nomoj. Ne necesas miri, ke tiaj tragedioj ne restis longe en la repertuaro kaj ofte malaperis post du-tri

Internacia Scienca Asocio Esperantista

spektakloj. Estis kelkaj dramverkistoj, kiuj strebis "revivigi" la tragedion kaj interesigi la publikon pri siaj verkoj (Compiston, Lagrange-Chancel), ili strebis vekti teruron kaj scivolemon de spektantoj, frapi ilin per nekutima kolizio au solvo. Ili preferis amgalantajn pastoralajn au mitologiajn temojn, kiuj pritraktis kontraunaturajn pasiojn: ampasion de patrino al sia filo ("Sémiramis" de Crébillon), de frato al fratino ("Tikidate" de Compiston), ktp.

Plej konata el tiuj dramverkistoj estis Prosper Jolyot de Crébillon (1674 — 1762), kies verkoj estis plenaj de sang-romantikaj eventoj. En lia tragedio "Idoménée" patro kaj filo estas rivaloj en amo kaj mortigas unu la alian. En "Atrée et Thyeste" Atrée por venĝi al sia frato Thyeste mortigas lian filon kaj regalas Thyeste de lia sango. En la tragedio "Radamisthe et Zénobie" la reĝo Pharasmane pro ĵaluzo mortigas sian rivalon, ne sciante, ke li mortigas sian propran filon, kaj kiam li ekscias tion, li sinmortigas pro malespero. Crébillon fieris, ke ofte virinoj svenis dum plej teruraj epizodoj de liaj spektakloj. Dramverkaro de Crébillon ne havas humanecan bazon, karakteran por la verkoj de Corneille kaj Racine, en liaj verkoj regas kruda voluptamo kaj nigraj, fatalaj eventoj. Crébillon mem skribis pri siaj tragedioj: "Mi ne havis elekton: Corneille alproprigis la ĉielon, Racine alproprigis la teron. Por mi restis nur infero — kaj mi jetis min tien sen hezito." ²

Ĝuste tiu infero plej bone respegulis la gustojn de trosatiginta aristokrataro de tiu kriza epoko, senigita de iuj ajn sociaj idealoj kaj altaj

¹Rigardu: Adam A. "Histoire de la littérature française au XVII siècle.", v. 5, P, 1964, p.251-259.

²Citata lau "La historio de okcidenteuropa teatro", v. 2, Moskvo, 1957, p. 121.

³Adam A., Citita verko, p. 277

streboj. Crébillon bonege komprenis interesojn de tiu publiko, serĉanta streĉitajn sentojn, li komprenis la spiriton de sia epoko kaj plenigis siajn tragediojn de incestaj historioj kaj patologiaj pasioj. Kelkfoje tiuj historioj povis respieguli veran situacion de altrangaj spektantoj.

Malgrau la krizo de klasikisma literaturo, la komedio restas vivkapabla: de 1689 ĝis 1700 : parizaj teatroj surscenigis trioble pli da komedioj, ol tragedioj³. Eblas kompreni la intereson de franca publiko al komedio, ĉar ĝi versimile respiegulis ĉiutagan vivon kaj morojn de tiutempa franca socio. Evidente, la komedio iĝis ĉefa ĝenro en la franca teatro dank' al Molière, kies verkaro ludis tre grandan rolon en la evoluo de franca komedio. La verkoj de Molière komencas novan etapon de franca klasikismo. Li kreis "altan komedion", donis al ĝi profundan socian sencon, liberigis strikte limigitan formon de la komedio, kreis diversajn ĝenrajn nuancojn.

Tre grava trajto de nova komedio ĉe la limo de la XVII-a ĝis la XVIII-a jarcentoj estis la rifuzo de abstrakt-ĝeneraliga metodo, propra al klasikismo. En la komediojn penetras konkreta historia enhavo. En multaj komedioj de tiu epoko aperas nomoj de francaj urboj, provincoj, estas menciataj konataj en tiu tempo homoj kaj eventoj, foje estas eĉ precizaj datoj — ĉio tio substrekas, ke la eventoj de la komedio okazas en Francio en la epoko de Ludoviko la XIV-a.. Sed multaj komediverkistoj serĉis facilan sukceson kaj tute ne strebis en siaj komedioj paroli pri seriozaj problemoj, ili montris faktojn, eventojn, juĝprocezojn, novaranĝojn, konataj al ĉiuj. ("Comète" de Donneau de Visé et Fontenelle, "Le mari retrouvé" de Dancourt). Ekzemple, en diversaj tavoloj de franca socio estis pasio por hazardludoj, kaj aperis multaj

komedioj, kies personoj havas tiun malvirton ("Joueur" de Regnard, "Chevalier—Joueur" de Dufresny, "Désolation des Joueuses" de Dancourt).

Kune kun la nova temaro aperis novaj komediaj tipoj, kiuj ankoraŭ ne ekzistis en la komedioj de Molière: ruiniĝantaj aristokratoj, kiuj vivas je la konto de virinoj ("L'Homme à bonne fortune" de Baron, "Le Chevalier à la mode" de Dancourt), virinoj — aventuristinoj, kiuj pensas nur pri tio, kiamaniere delogi virojn, kiuj povas esti utilaj por ili ("Bourgeoises de qualité" de Dancourt), sur scenejo aperas ankaŭ financistoj ("L'usurier" de Thomas Corneille et Donneau de Visé).

La komediverkistoj respiegulas realan vivon kaj pro tio pli kaj pli atentigas la temon de mono, la mono iĝas la bazo de komedia intrigo, kiu liberiĝas de unueca klasikisma karaktero, kiu personigas malvirtan pasion, ĉar la komedia tipo mem sentas influon de ĉirkauanta medio, ĝi subiĝas al la povo de mono, — kiu ofte kuzas liajn agojn. En la pritrakto de komedia karaktero okazas gravaj ŝanĝoj, ĝi proksimiĝas al Don Juan de Molière, iĝas pli versimila kaj enhavas kontrastajn trajtojn.

Tamen necesas rimarki, ke malgrau versimileco plej granda parto de tiuj komedioj estis malpli altnivela ol la verkoj de Molière. Ili ne havis filozofian profundecon de Molière, tie preskau forestis pozitivaj personoj. Dramverkistoj, rakontante la eventojn, restis kvazau flanke, ili ne strebis fari moralajn konkludojn, pensante, ke la spektantoj mem faros necesajn konkludojn.

Alia grava novaĵo en la evoluo de komedia ĝenro estis la tipoj de servistoj. Tiuj personoj havas tradiciajn komediajn trajtojn, sed samtempe ili ensorbis trajtojn, prenitajn el reala vivo, kiu respiegulas kreskon de

sinkonscio de tiuj reprezentantoj de la tria socia tavolo. La servistoj jam ne kontentiĝas de ilia socia situacio. En la verkoj de plej talentaj komediverkistoj de tiu epoko ("Le légataire universel" de Regnard, "Turcaret" de Lesage) ili strebas fari socian karieron kaj intrigas plejparte en siaj propraj interesoj. Tiamaniere estas preparata la apero de Figaro de Beaumarchais, kiu personigas plej bonajn trajtojn de franca popolo ("Le mariage de Figaro"). C. Lenient, analizante la literaturon de tiu epoko, venis al la konkludo, ke "la historio de la komedio iĝas por mi la historio de nuntempa socio ne nur dank' al la tipoj, kiuj aperas en ĝi, ne nur dank' al la absurdaĵoj kaj mankoj, kiujn ĝi primokas, sed ankaŭ dank' al tiuj ideoj, kiujn ĝi proklamas"⁴. Novaj ideoj videblas aparte bone en la komedioj en la pritrakto de tipoj de servistoj.

Adreaso de la autorino: Ljudmila I. Mursalijeva
Katedro de Filologio
Baŝkiria Ŝtata Universitato
GUS 450077 UFA - 75
Ul. Bluĥera 4/1-85
RUSIO - BAŜKIRIO

⁴ Lenient C. "La comédie en France au XVIII s.", v. 1, Parizo, 1888, p. VI.
Rig. ankaŭ: Calame A. "Régnaud . Sa vie et son oeuvre", Alger, 1960; Blanc A. "La comédie française à l'heure du soleil couchant. Dancourt"; Moureau F. "Un singulier moderne. Dufresny", Lille, 1979 kaj aliajn.

RIMARKOJ EL IZOLULA ANGULO

RADOSLAW NOWAKOWSKI (PL)

Mi ne estas esperantisto -

ĝuste pro tio, ke laŭnature mi estas izolulo, kaj al mi faras ete abomenon ĉiu ajn grupiĝado, en kiu oni devu poste vivi laŭ komune elpensitaj sloganoj.

Tamen mi lernis (kaj daŭre lernas) tiun ĉi lingvon samkiel kelkajn aliajn kaj mi uzas ĝin. Plimulto da miaj verkaĵoj estas verkitaj dulingve: en la pola kaj en esperanto.

Iam, antaŭ longe, mi imagis la jenan situacion: se ĉiu verkus siajn tekstojn gepatrolingve kaj esperante, ili ne devus esti tradukitaj (supozante ke esperanto estus vaste konata kaj uzata); plie: ĉiukaze ni havus la version originalan, aŭtoran, do la plej autentikan, ĉar tradukaĵo estas nur ia proksimumo, io kvazau foto de la pentraĵo (kompreneble tiuj konsideroj rilatas pli al tekstoj artaj ol sciencaj kaj teknikaj). La plej lerta tradukisto ne divenos plene la intencojn de la aŭtoro; neniu povas pli multe, pli koreme, pli freneze perdiĝi en la labirinto de vortoj kaj frazoj ol tiu kiu ilin verkis.

Kaj plu: tekston oni necesus traduki nur unufoje - nekredebla ŝparo da tempo kaj energio, kompreneble ne por l'aŭtoro, kiu devas prepari du tekstojn anstataŭ nur unu. Tamen li ankaŭ havus profiton, nome la teksto estus tuj legebla por preskaŭ ĉiuj supozante ke ĉiuj konus esperanton; interese estus scii kiujn profitojn havus armeo da naturlingvaj tradukistoj, kiu iĝus senlabora.

Vere freneza kaj fola ideo. Bonŝance mi ne sukcesis iluziiĝi, ke dank'al tiu ĉi ideo miaj libroj estos legataj tutmonde. Ne eblos pro jena kialo: ili estas farataj mane en ekstreme malmulta kvanto. Malgraŭ tio la frenezeco de l'ideo estis neniel fuŝita. Belaj estas tiaj foloj. Belaj kaj ĉastaj, ĉar bezonataj de neniu. Same kiel bela kaj ĉasta kaj de neniu bezonata povas esti soluleco.

Internacia Scienca Asocio Esperantista